Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Marto-Aprilo 2017 | n-ro 03-04 (1341-1342)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Broadway

Asfalt', kiel vitro... Mi iras sonore.
Arbaroj, herberoj 'as forrazitaj.
Avenuoj longas desude alnorde,
Kaj deoriente alokcidente – stritoj [*].
Sed inter (kien metaĉis vin homa ard'?)
Situas tro altaj domoj senpune;
Kelkaj altas ĝis la stelar' ,
Aliaj el ili – ĝislune.
Jankio plandumojn foruzi tre pigras:
Jen lift' komuna, jen lift' kuriera.
Je la sepa matene ĉiuj enmigras,
Je la kvina vespere ĉiuj eksteras.
Maŝinoj grincadas, teruras rumoro,
Sed mutas en bruo la homoj, krome.
Dum dentumi maĉgumon – ĉeset', laŭmore;
Por elbuŝigi "Mejk monej?"
Patrino la mamon al ido ludonis.
Beb' suĉas, nazmuke plenas je ĝojo.
Li ja seriozan aferon ekkonis.
Kvazaŭ dolaron... Je la unua fojo.
Finiĝis laboro. La korpon ne troe
Ventumu per vent' elektra senĉesa
Ĉu vi volas subgrunden? Iru metroe.
Ĉu al ĉiel'? Elevatore plu restu.
Jen ĝis alta pinto rapidas vagonoj,
Jen ili rampas ĉe la domaj zonoj.
En Bruklin, sur ponto, la vosta aldono
Aperos. Kaj poste – sub Hadson impona.
Vi nun preskaŭ blindas. Vi nun eĉ dormemas.



Sed... Ho! Verton frapas tambura galop'.
El mallumo hakas kaj vi forte tremas:
"Kafo Maksŭel! Gud tu zi last drop!"
Lanternoj strataj, ekŝpatu la nokton!
Malfebla flamo, mi devas atesti...
Maldekstre kaj dekstre observu la fakton.
Ho, panjo, min vartu! Hezitindas ĉeesti!
Do, certe, troveblas por la moskva publiko
Rigardindaĵoj: unu aŭ du.
La strato ja longas, kiel tuta Afriko!
Tio estas Novjork'! Kaj tio – Brodŭej! Haŭ du ju du!
Min tutravis Novjorko. Kolose, brile!
Sed kaskedon ne demetos mi kun timo.
Al burĝaro ni rigardas malhumile:
Sovetuloj havas propran memestimon.

V. Majakovskij, 1925

*Tradukis: Espopore (Evgenij Georgiev)*

[*] Rekta laŭprononca paŭsaĵo de la angla "street" (en la originalo – "стриты").

# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen numero iom pli maldika ol kutime, kiu ampleksas nur 24 paĝojn. Pro la daŭre ne rekaptita malfruo en la aperritmo de Sennaciulo, la redaktoskipo decidis tamen eldoni ĝin tia, kia ĝi estas, ĉar kolekto kaj prilaborado de aldona materialo kaŭzus plian prokraston. Do, jen klara alvoko al ĉiuj: ne hezitu tuj prepari kontribuojn por la venontaj numeroj! Sennaciulo daŭre spegulas la partoprenemon de ĝiaj legantoj.

La numeron enkondukas du reagoj al pasintnumeraj artikoloj, kio ĉiam estas kuraĝiga indiko pri la utilo de Sennaciulo kiel komuna debatejo de ideoj. Abunde nutrataj estas la rubrikoj pri sindikatismo tutmonda, kaj ankaŭ tiu pri beletro, en kiu vi krome trovos ekzemplojn pri malfacilaĵoj renkontataj dum la redakto-procezo.

Krome vi trovos materialon ĉu por prepari vian fizikan partoprenon al la venonta SAT-kongreso, ĉu por interŝanĝi antaŭe, dume kaj poste kun la kamaradoj, kiuj tie ĉeestos. Ja Hori Jasuo provizas materialon pri atomenergia politiko, kiu kompletigos lian planitan tiuteman prelegon. Kaj vi krome povos iom legi pri folklora vespero kaj pri unu el la celoj de kongresaj ekskursoj, insulo kie la franca imperiismo antaŭis de kelkaj jaroj la japanan kaj usonan.

Agrablan kaj verko-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

Noto de la redaktejo: Ekde la pasinta numero ni sendas perrete al ĉiuj abonantoj kun konata retadreso la elektronikan version de la revuo. Kompreneble, por ĝin sendi, ni bezonas scii vian retadreson. Se vi deziras ricevi ĝin, sufiĉas sendi al ni (sennaciulo.redaktejo@gmail.com) retmesaĝon kun via nomo aŭ matrikul-numero

## Venontaj limdatoj

Sennaciulo 7-8 (1345-1346) : 20a de junio

Sennaciulo 9-10 (1347-1348) : 20a de aŭgusto

Frontpaĝa bildo: Insulo Ganghwa

# Enhavo


## El la leterkesto

4 Kelkaj notoj al la artikolo "Minacas Eŭropon faŝismo en Hungario" Josef KROB

4 Pri la sekcio "Aforismoj kaj diroj" de la numero 07-08 (2016) Saioa ESCOBAR

## Tra la Mondo

5 Ruĝaj linioj en Turkio NXC

6 Tie ĉi mizero festas balon Abik ELKIN

## Sindikatismo tutmonda

7 Filipinoj: restarigo de la mortopuno proksimiĝas

8 Hungario: Kuracistoj Sen Landlimoj denuncas la policajn perfortojn ĉe la hungara landlimo

8 Hungario: Sindikataj gvidantoj de la publika sektoro estis maldungitaj en senprecedenca atako

9 Irano: Ni postulu liberecon por la sindikata gvidanto Esmail Abdi

9 Kazaĥio: Ni savu la Konfederacion de Liberaj Sindikatoj el trudita malfondo

9 Ukrainio : la transport-laboristoj de Kievo spertas atakojn kontraŭ siaj rajtoj

## Beletro

2 Broadway V. Majakovskij

10 Monaj ĉifonoj (2) Espopore

11 Raymond Queneau: la tempo kaj la lingvo Ĝemil KSUS

14 Pri perfidoj inter kamaradoj Pedro Sanz

23 Alia mondo eblas Hans-Georg Kaiser

## Ekologio kaj mediprotektado

14 Atomenergia politiko en Japanio kaj en ĉirkaŭaj aziaj landoj HORI Jasuo

## Liberpensula Frakcio

16 Por la respekto de la sekularismo

## SAT-anoj aktivas

17 Poemoj de hispanaj esperantistoj en grava hispanlingva poezia revuo Miguel FERNÁNDEZ

## 90a SAT-kongreso

18 Folklora Vespero: Espera Mondo

19 Insulo Ganghwa

## Intelekta memdefendo

20 Pri pensaĵo de Susan George Roland PLATTEAU

20 La trumpeto marina Serĝo (32412)

## Nekrologo

21 Jakobo Fiŝu' (Jacques Fichou)

21 Vladimir Bespalov

## El la SAT-Administrejo

19 Novaj aliĝoj

21 Donacintoj

22 Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:* ***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***

# Kelkaj notoj al la artikolo “Minacas Eŭropon faŝismo en Hungario”

## (Sennaciulo 2016/09-10, paĝo 14)

Unue mi devas klarigi unu gravan nocion :

**FOBI|O**

1. (medicina termino) Senvola, obseda angora timo, spertata de iuj malsanuloj en difinitaj cirkonstancoj.

2. (scienca sufikso) Malsaneca timo pro iu objekto aŭ iu ago : (agora-, kancero-, klostro-, akvofobio...)

(Ĝis tie ĉi PIV)

La aŭtor(in)o de la artikolo, (VS), plendas pri la postsekvoj de kelkaj gravaj aferoj, sed li/ŝi tute neglektas la kialojn de tiu hontoplena stato. Viktor Orbán klopodas per ĉiuj rimedoj unuavice bari islamigadon de Eŭropo. La timo antaŭ islamo ne estas iu “fobio”, kiel la aŭtor(in)o skribas, sed tio estas por ni, Eŭropanoj, REALA danĝero. La rifuĝintoj estas precipe junaj, muskolaj viroj. Kial ili estas ĉi tie? Kial ili ne restas hejme kaj ne defendas sian propran landon, sian propran urbon, sian propran domon kontraŭ la malamikoj?! La plejmulto el ili venas el la landoj, kie neniu milito furiozas, kaj tiuj (gravedaj) virinoj kaj infanoj servas al tiuj fiuloj kiel rimedo de la sentoplena ĉantaĝado.



Stepan Bandera

Mi, kiel esperantisto, konsentas, ke rifuĝintoj antaŭ la milito bezonas helpon. Sed! Sed! Sed! Se vi volas al iu ajn helpi, unue vi mem, kiel la savanto, ne povas esti endanĝerigita. Tiamaniere tio almenaŭ staras en nia (ĉeĥa) leĝaro. Do, kion vi faros, se tiuj rifuĝintoj tuj informos vin, ke post kiam ili ekestos la plejmulto en via regiono, ili enkondukos tie siajn proprajn leĝojn, sian propran religion kaj sian propran kulturon – kaj ve al vi! Se vi ne respektos tiujn ŝanĝojn kaj ne adaptiĝos, vi estos sklavigita aŭ mortigita. Vi certe volonte vin donos al ili kaj helpados al ili ĝis kiam ili atingos la menciitajn celojn...

La situacio en Eŭropo ne estas nigra-blanka, sed kelkaj homoj klopodas, ke ĝi tia estu. Al iu ne plaĉas, ke en Hungario oni celebras faŝiston Bálint Hóman. En Ukrainio oni celebras faŝiston Stepan Bandera (Степан Бандера), kaj neniu potenculo en Eŭropo protestas – nu, ĉiu mezuras laŭ sia mezurilo...

Fakte, en Eŭropo regas ĥaoso – t.n. BREXIT en Britio, Donald Trump estas prezidento en Usono, la referendumo en Italio ankaŭ ion diras, nun minacas, ke la prezidentino de Francio fariĝos Marine Le Pen, ke en Nederlando fariĝos Geert Wilders la prezidanto de la registaro... Kio ankoraŭ devos okazi, por ke la eŭropaj gvidantoj ekagu kaj faru ion pozitivan por la eŭropa loĝantaro, sen tio, ke eŭropaj nacioj turniĝos reen al faŝismo? Mi asertas, ke plendi pro postsekvoj ne sufiĉas...

Josef Krob, 36 064

# Pri la sekcio “Aforismoj kaj diroj” de la numero 07-08 (2016)

En la numero 07-08 (2016) de *Sennaciulo* mi legis kun intereso en la sekcio “Aforismoj kaj diroj” artikolon titolitan “Viroj estas...”. Je la fino de la paĝo la redaktoskipo demandas la legantojn, kion ni opinias tiurilate.

Mi pensas, ke kelkaj konkretaj esprimoj estas seksismaj, kaj la tuto de la paĝo iom konfuza, kaj ĝi povas konduki al miskomprenoj. Al mi ne ŝajnas bona ideo kunigi nekonektitajn frazojn rilate al tiu temo. Probable Donjo kaj Cezar faris la kolekton de diraĵoj bonintence, sed tiaj citaĵoj sen kunteksto kaj sen interpreto perdas sian sencon.

Tial, kvankam en la teksto aperas frazoj de konataj feministinoj kiel Simone de Beauvoir aŭ Susan Sarandon, ni trovas tie ankaŭ citaĵojn de reprezentantoj de la novliberalisma ideologio, kiu rekte oponas al feminismo, kiel Margaret Thatcher aŭ Hillary Clinton.

Kelkaj frazoj diras, ke viroj stultas, senutilas, simplas... Temas nur pri transmetoj de masklismaj esprimoj pri la virinoj, kiel “la virinoj ne scias stiri veturilojn, ili nur scipovas fari hejmtaskojn”. Pro tio, ili jam estas masklismaj esprimoj. Pere de tiaj esprimoj la patriarkeco reproduktas kliŝojn – genrajn konstruaĵojn – por subpremi ne nur virinojn, sed ankaŭ virojn. Ĝi generas modelojn de viro kaj de virino, laŭ kiuj la unua devas iĝi la panakiranto en la hejmo, la ĉefo de la familio kaj esti forta, potenca... Tiaj ideoj estas reproduktitaj ankaŭ en la diraĵoj de la sekcio, en kiu oni parolas pri la vanto, la bruo kaj la superbo de la viroj.



**Simone de Beauvoir**

Sed ne ĉiuj diraĵoj en la teksto estas fuŝaj. Ekzemple, la frazo de George Clooney ŝajnas al mi interesa, ĉar li denuncas la fakton ke ĉe la viroj la aspekto ne valoras tiom kiom ĉe la virinoj. Ankaŭ la anonima frazo "Kiel aspektus la mondo sen viroj? Nek estus perforto, nek militoj kaj amaso da dikaj feliĉaj inoj" plaĉas al mi. Oni tamen devus precizigi tiun ideon. Miaopinie, la aŭtoro de la frazo volas esprimi, ke la mondo pli bonus ne sen viroj, sed sen masklismaj viroj. Tio estas, virinigita mondo sen patriarkeco kaj sen masklismaj viroj estus mondo sen militoj kaj kun liberaj virinoj.

Verŝajne tia nenoca sekcio, kie oni kunigas aforismojn, reflektas ankaŭ la masklismon ĉeestantan en ĉiuj sferoj de la socio. Tio estas do la patriarkeco: sistemo, kiu eniras en ĉiun sferon de la homo. Gravas, ke ni konsciiĝu pri ĝi, por ke ni kapablu efike kontraŭstari ĝin. Tiusence, estus konstrue pritrakti (kelkajn) artikolojn en *Sennaciulo* el genra perspektivo.

Saioa Escobar



# Ruĝaj linioj en Turkio

Ĝis kiam pretas atendi Eŭropa Unio por sincere postuli klarigojn al Turkio? Ne perturbas, ŝajne, la persekutoj kaj murdoj kontraŭ la kurdoj, la silentigado de la kritikaj voĉoj, la purigado farita en la Administrado... Du respondeculojn kaj naŭ deputitojn de la PDP [1] oni enkarcerigis hieraŭ (*). Recep Tayyip Erdogan, la prezidento de Turkio, faras kion li volas. Kion li volas kaj kiel li volas. Senpuneco tuj apud la Eŭropa Unio. Nun li estas najbaro de la Eŭropa Unio, sed membro volas esti. Antaŭlonge oni komencis la negocadojn por ke ĝi iam povu esti.




"Ni esperas, ke Turkio respektos sian parlamentan demokration, inkludante la homrajtojn kaj leĝojn", laŭ la diro de Federica Mogherini, ĉefo de la ekstera politiko de la Eŭropa Unio. Pasintan mardon Martin Schulz, la prezidento de la Eŭropa Parlamento, atribuis al Turkio esti transpasinta la ruĝajn liniojn de la esprimlibereco pro la operaco kontraŭ la ĵurnalo Cumhuriyet. "Mi fajfas pri viaj ruĝaj linioj", orgojle respondis Binali Yildirim, la unua ministro.

Turkio minacis Eŭropan Union : paŝojn ĝi volas, por ke la turkoj povu senvize eniri Eŭropon; se ne, ĝi forlasos la traktaton pri migrado – akordo, per kiu Turkio retenas kaj forsendas rifuĝintojn. Se estos tiel, ruĝa linio estos ne por Turkio, sed por Eŭropa Unio, kaj ĝi daŭre englutos ĉion, kion faros Erdogan.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj) :

[1] Partio Demokrata de la Popolo (PDP)/Partiya Demokratik a Gelan (PDG). Halklarin Demokratik Partisi (HDP), en la turka.

Klarigoj :

Aŭtoro : Jakes Goikoetxea.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 5-an de Novembro 2016-a.

*Tradukis : NXC. Decembro 2016-a.*

*Provlegis : Aitor Arana kaj Dominik Schramm*



### Statistika oficejo starigis diagnozon al Latvio

# Tie ĉi mizero festas balon

## Ĉiu tria mizerulo

Lastsemajne ni ankoraŭfoje konvinkiĝis, ke oni ĝuste faris, akceptinte Latvion en klubon de riĉuloj kun nomo OECD. Almenaŭ en tiu klubo ni distingiĝos per ... nia mizero. Jes, laŭ kalkuloj de la statistika buroo, 606 miloj da loĝantoj en Latvio (t.e. ĉiu tria loĝanto de la lando) estas submetitaj al risko de mizero kaj jam nun la enspezoj de tiu parto de la loĝantaro estas pli malgrandaj aŭ egalas al viva minimumo. Tio ĉi estas fakte ĉio, kion al alilandanoj necesas scii pri la ekonomio de Latvio.

Kia, do, estas respondo de regantoj al tiuj ĉi ŝokantaj faktoj? Respondo mankas kaj ne antaŭvideblas! Ankoraŭ antaŭ du jaroj la Ministerio de Bonstato promesis ellabori minimuman konsuman korbon, t.e., precize kiom, do, hodiaŭ meze elspezas loĝanto de Latvio por nutraĵoj, vestaĵoj, medikamentoj kaj por aliaj vivnecesaj bezonoj. En la pasinta semajno klariĝis, ke dum du jaroj tiu ĉi korbo tamen ne estis kompilita, kaj la Ministerio de Bonstato pro malsufiĉo de rimedoj rifuzis ankaŭ fari reformon de sociala helpo. Jen tia ĉi ĉe ni estas historio de sukceso.

## Talento al grandaj malversacioj

"Historio de la sukceso" finiĝis ankaŭ per provo reanimigi projekton "e-sano" – unuecan elektronikan bazon de medicinaj dokumentoj. Kiel informis gvidantino de la Ministerio de Sano Anda Ĉakŝa, la projekto estis kreata dum 9 jaroj, por ĝia pretigo estis elspezitaj jam pli ol 11 milionoj da eŭroj, sed el deko da funkcioj dume oni sukcesis vivigi nur unu – familiaj kuracistoj en interreto plenigas dokumenton pri malsano de paciento. Nu, kion diri pri tio ĉi? Per tia mono la projekton povus krei eĉ gelernantoj kapablaj pri IT-teknologioj. Verŝajne, ne valoras eĉ priparoli, ke kulpuloj pri malŝparado de la ŝtataj rimedoj ne estas trovitaj. Pli precize, ilin oni eĉ ne serĉis. La mono ja estis ne el propra poŝo, sed el la ŝtata. Oni povas elspezi tiun monon laŭ sia propra deziro.

## Bato, ankoraŭ bato

"Komence ni finos kun lernejoj, poste ni ekokupiĝos pri altlernejoj" – verŝajne sub tiu devizo laboras oficistoj de la Ministerio de Klerigo. Lastsemajne daŭradis ekflamiĝinta skandalo ĉirkaŭ la tiel nomata reformo de instruistaj salajroj. Rezulte de tiu ĉi malĝoja reformo, salajroj malgrandiĝis



**Vejko Spolitis**

al preskaŭ 30% de la instruistoj. Salajroj ne ŝanĝiĝis al plimulto de pedagogoj. Aperas demando: en kio tiam estas la reformo, kaj en kio estas celo de ĉiuj tiuj ŝanĝoj? Ĉu por kunpuŝigi frunt-al-frunte la instruistojn mem? Instruistoj estas en embaraso – kial al unuj pedagogoj, ĉe sama oficŝarĝo, la salajroj estas pligrandigitaj, kaj al aliaj, male, malgrandigitaj?

Tamen la regantoj decidis ne halti je tio, kion ili atingis, kaj nun sub minacon trafis altlernejoj. Nome, se en la jaro 2018 ne estos pligrandigitaj asignadoj por altlernejoj, tiam estos necese redukti buĝetajn lokojn, kiuj jam sen tio estas malmultaj. Ja ne estas tio ĉi neatenditaĵo – tia ĉi politiko komplete eniras en la ĝeneralan koncepton de transformo de la lando al dezerto – por ke la junularo pli rapide elmigru el Latvio, enkalkulante sub preteksto de lernado.

## Politika tragikfarso

Ĉio estus ridinda, se ni ne devus pagi pro tiu ĉi bankedo. Dum la lasta semajno klariĝis, ke juĝesplorada komisiono de la parlamento, kiun gvidas eĉ doktoro de sciencoj, universitata instruisto Vejko Spolitis, ne kapablas skribi kvalitan resumon laŭ rezultoj de la laboro de tiu juĝesplora komisiono. Ĉu tio ĉi ne estas ilustra pruvo pri nivelo de niaj servantoj al la popolo? Trankviligas nur tio, ke plimulto da deputitoj jam antaŭe forlasis tiun ĉi komisionon, kaj ĝia prezidanto sinjoro Spolitis estas, en la parlamento, portempa figuro. Li laboras en la Sejmo laŭ tiel nomata mola mandato – dum tempo, kiam Edgars Rinkeviĉs plenumas devojn de ministro de eksterlandaj aferoj.

Sendependa deputito Artuss Kaiminŝ jam alvokis la Sejmon depreni de sinjoro Spolitis kaj de lia anstataŭanto la rimedojn elspezitajn por sensenca laboro de la komisiono. Dume la Sejmo pristudas iniciaton de Kaiminŝ. Inter alio lastsemajne fariĝis konate, ke al Kaiminŝ mem aperis grandaj politikaj malfacilaĵoj. El la partio, kiun li antaŭnelonge kreis ("Al kiu apartenas la ŝtato"), forkuris duono de la membroj de ĝia administracio. Verŝajne, tiuj forkurintoj baldaŭ kreos sian partion. En Latvio, kiel estas konate, estas malmultaj partioj – entute iuj 72 politikaj organizaĵoj.

Abik Elkin

*Fonto: Vesti Segodnja – Nedelja (28/10/2016 – 02/11/2016)*

*Esperantigis: Andris Natinŝ*

# Filipinoj: restarigo de la mortopuno proksimiĝas

La milito lanĉita de Rodrigo Duterte, prezidento de Filipinoj, kontraŭ drogo, ŝajne kondukos la landon al grava retropaŝo. En lia deziro plifortigi tiun batalon, la prezidento jam anoncis sian decidon, fiksi la punan plenaĝon je 9 jaroj, sed ĉefe restarigi mortopunon, tamen abolitan antaŭ 11 jaroj.

Kaj la iniciato de la Prezidento estas survoje al sukceso. Fakte, la teksto estis alprenita merkredon vespere, fare de plimulto el la reprezentantoj de la malalta ĉambro de la Kongreso. Definitiva alpreno de la teksto okazos post baloto en tria voĉdonado venontsemajne.

Ĉar la debatoj pri la temo estas finitaj, ambaŭ kampoj konsideras, ke tiu baloto estos nur formalaĵo. Ankaŭ la konsento de la Senato sendube estos facile akirita, ĉar la defendantoj de Duterte estas tie plimultaj. “Ni transpasis la ĉefan malfacilaĵon”, ĝojis Reynaldo Umali, la porparolanto de la defendantoj de la projekto.

## Indigno de la opozicio kaj de la asocioj

“Tiu antaŭeniro de la Filipina Kongreso en la celon restarigi la mortopunon konsistigas novan retropaŝon por la Homaj Rajtoj, jam minacitaj de la ekscesa milito de Duterte kontraŭ la drogo”, deklaris Phelim Kine, helpdirektoro por Azio ĉe Human Rights Watch (HRW).

Laŭ la teksto, la mortopuno estos restarigita nur por la krimoj en rilato kun drogŝakrado, kiel produktistoj, vendistoj, kaj ankaŭ kontraŭ ĉiuj personoj surprizitaj kun 500 gramoj da haŝiŝo aŭ 10 gramoj da kokaino aŭ ekstazio. Ankaŭ murdoj kaj seksperfortoj plenumitaj sub influo de drogo, estos punitaj per morto.

## Pli ol 4000 personoj mortigitaj en neklarigitaj cirkonstancoj

La organizaĵoj pri defendo de la Homaj Rajtoj antaŭtimas plimultigon de juraj ekscesoj. Raporto publikigita la 1an de marto fare de HRW denuncas intencajn kaj amasajn murdojn. Tiu kampanjo “konsistigas krimon kontraŭ homaro”, alarmas HRW. Ĵaŭdon, la “Internacia Organo de Kontrolo de la Narkotaĵoj” kondamnis la “eksterjurajn” operacojn kondukitajn de la aŭtoritatoj.

De post sia enpostenigo fine de junio, la Prezidento Dutertre kondukas teruran lukton kontraŭ drogŝakrado. Lia prezidentbalota kampanjo ege agresiva pri tiu temo, kondukis lin al venko. Li interalie proklamis sian volon mortigi milojn da personoj, se tio ebligas malaperigi la drogŝakradon. Ŝajnas, ke li respektis sian promeson, ĉar de post lia elekto, la polico anoncis mortigon en stato de legitima defendo, de pli ol 2500 drogŝakristoj aŭ drogemuloj, dum pli ol 4000 personoj estis mortigitaj en neklarigitaj cirkonstancoj.

*Informo el Neniam milito inter ni (03/03/2017)*

*http://neniammilitointerni.over-blog.com/2017/03/filipinoj-restarigo-de-la-mortopuno-proksimigas.html*




**La 8an de oktobro 2016, en la ĉirkaŭurbo de Kezon, nord-oriente de Manilo, en Filipinoj, manifestaciantoj tenas afiŝtabulojn dum kandela kolektiĝo kontraŭ la eksterjuraj ekzekutoj, kadre de la milito de Duterte kontraŭ drogo.**

# Hungario: Kuracistoj Sen Landlimoj denuncas la policajn perfortojn ĉe la hungara landlimo



Frapoj, plorigaj gasoj, hundaj mordovundoj, ŝuoj kaj vestaĵoj konfiskitaj kore de vintro... la hungara polico estas akuzata pri « sistemaj » kaj « kutimaj » mistraktadoj kontraŭ la migrantoj, kiuj provas kontraŭleĝe atingi Hungarion, tra Serbio aŭ Kroatio.

La akuzo devenas de la NRO Kuracistoj Sen Landlimoj (KSL), kiuj mencias la atestojn de migrantoj, flegataj en la sancentroj de KSL, ĉefe en Belgrado :

« Multegaj plendoj atestas pri perfortoj, kiuj ne ĉiam postlasas spurojn sur la haŭto. Koncerne fizikajn vundojn, ni konstatas spurojn de frapoj, kontuzojn kaj, de post meze de la pasinta jaro, kazojn de hundmordoj », substrekas Momcilo Djurdjevic, kuracisto ĉe KSL.

Hungario komencis konstruadon de dua kontraŭ-migranta barilo ĉe sia landlimo.

Aliparte, nova leĝo antaŭvidas sisteman malliberigon de ĉiuj azilpetantoj kaj novaj alvenintoj, kaj lokumadon de ili en transita areo ĉe la landlimo, kie ili estos loĝigitaj en aranĝitaj konteneroj.

*Informo el* Neniam milito inter ni *(10/03/2017)*

*http://neniammilitointerni.over-blog.com/2017/03/hungario-kuracistoj-sen-landlimoj-msf-denuncas-la-policajn-perfortojn-ce-la-hungara-landlimo.html*

# Hungario: Sindikataj gvidantoj de la publika sektoro estis maldungitaj en senprecedenca atako



La 13an de januaro, kvar sindikatanoj estis maldungitaj dum la salajra intertraktado, fare de la Ĝenerala Direktoro de Fővárosi Közterület-fenntartó (senprofita) – FKFZrt, publika entrepreno taskita pri zorgado de la publika sektoro. La sindikataj delegitoj postulis justan salajran altigon, kaj esprimis sian volon uzadi strikon pro la malkontenteco de la laboristoj. Responde, s-ro István Csontos, Ĝenerala Direktoro de la entrepreno taskita pri administrado de forĵetaĵoj, sanigado kaj purigado da la publikaj lokoj de la ĉefurbo Budapeŝto, ne nur maldungis la kvar kolegojn, sed elpeladis ilin el la sindikataj lokaloj. András Király, sekretario de la sindikato de la entrepreno, unu el la sindikatanoj maldungitaj, estas ankaŭ prezidanto de la sindikato de la municipaj laboristoj HVDSZ2000, kaj membro de la plenuma komitato MASZSZ. La sindikato, kun la subteno de MASZSZ, kaj de ties aniĝintoj, plu provas trovi solvon al tiu konflikto. Temas pri senprecedenca decido en la publika sektoro, en publika entrepreno. La hungariaj sindikatanoj timas, ke tiu ago estu komenco de nova kontraŭ-sindikata periodo en la lando.

*Informo el LabourStart*

*https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3349*

# Ukrainio: la transport-laboristoj de Kievo spertas atakojn kontraŭ siaj rajtoj




En aprilo 2016, la laboristoj de la publika transport-entrepreno Kyivpastrans fondis sendependan sindikaton, por lukti kontraŭ la malobservadoj de la sekurecaj normoj en la trolebus-garaĝo Kurenivske.

La administrado rifuzis agnoski la sindikaton, kiu aliĝis al la Ukrainia Konfederacio de la liberaj sindikatoj. Ĝi premis, minacis kaj timigis la membrojn de la sindikato per ĉantaĝoj, nuligo de kromsalajroj, provizora maldungo, elpelado de la loĝejo provizita de la entrepreno, kaj fizikaj agresoj. Helpu al protektado de la sendependa sindikato en Kyivpastrans, sendante mesaĝon al la urbestro de Kievo.

*Informo el LabourStart*

*https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3326*



# Irano: Ni postulu liberecon por la sindikata gvidanto Esmail Abdi

S-ro Esmail Abdi, instruisto kaj sindikata gvidanto, estis kondamnita al ses jaroj da malliberejo pro falsaj akuzoj, interalie pro "kolektiĝo kaj koluzio kontraŭ la nacia sekureco". Tiuj akuzoj estas maljustaj kaj malobservas plurajn konvenciojn pri homaj rajtoj, inkluzive tiujn, kiuj protektas liberecon de esprimo kaj asociiĝo, kaj ankaŭ la rajton por la sindikatoj, esti konsultataj koncerne la politikojn pri edukado. La aŭtoritatoj provas silentigi la postulojn de la instruistoj pere de represio kaj daŭra mallibereco de sindikatanoj kaj aktivuloj.

*Informo el LabourStart*

*https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3226*

# Kazaĥio: Ni savu la Konfederacion de Liberaj Sindikatoj el trudita malfondo




De pluraj jaroj, la kazaĥa registaro limigas la rajtojn kaj sindikatajn liberecojn. Ĝi faras premon kontraŭ la sindikataj organizaĵoj kaj ties gvidantoj. Tiu senhalta turmentado atingis kulminon per la anonco fare de la kazaĥaj aŭtoritatoj, ke ili intencas malfondi la Konfederacio de Liberaj Sindikatoj de la Kazaĥa Respubliko. Kun siaj aliĝintoj, la Konfederacio kampanjas kontraŭ tiu trudita malfondo, kaj alvokas la solidarecon de la internacia sindikata movado. Vi povas subteni ĝian postulon, subskribante la ĉi-suban mesaĝon, kiu estos sendita al la Prezidento de la Respubliko de Kazaĥio.

*Informo el LabourStart*

*https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3255*

# Monaj ĉifonoj (2)

## Sceno 3

Subite, kun bruego je la sama loko, kie trovas sin la interparolantoj, aperas iu homo nigre vestita. Eksonas epika melodio. De la plafono falas multaj etaj arĝentaj steloj.

**Homo En Nigro (persono enigma)**
*(kantas)*

Detrui la radikojn de malbon',
Instrui kiel vivi,
Ekaŭdi la voĉon de Savont',
Vivisekcii...

Latente vi ja estas pura reĝ' –
Vi ĉion povas fari.
Sed mi sugestas pri la preĝ';
Pli bonas, ol malŝpari.

Detrui la radikojn de malbon',
Instrui kiel vivi,
Ekaŭdi la voĉon de Savont',
Vivisekcii...

Sed kiu estas mi en ĉi festen'?
Enigmo ege granda...
Ĉu rifuzeblas la posten'?
Jen la demando.

Detrui la radikojn de malbon',
Instrui kiel vivi,
Ekaŭdi la voĉon de Savont',
Vivisekcii...

**Barbulo**
*(neniom mirinte)*

Saluton, sinjor'!
Kondutu sen jor'.

**Homo En Nigro (persono enigma)**
*(brakumante ambaŭ kunparolantojn)*

Nun sidiĝu, karaj, plene elegante
Kaj murmuru iom al mi en Esperanto.
Zamenhofo, ĝoju, pretu al mi kredi,
Idearon vian indos ja heredi.

La barbulo kaj la maljunulo interrigardas.

**Maljunulo**

Cionisme, cinikisme, popolisme per la braĝo
Ĉu vi frapas? Kial vi gapas?
Dismembrigi la bazaĵojn
Ne sukcesos, eĉ se rampos
Vi, komplota ido,
Kreitaĵo de l' perfido.

**Homo En Nigro (persono enigma)**
*(kun rideto)*

Kuracu la kapon,
Pli trafe: la rapon,
Kreskantan el kolo
Dank' al la bonvolo.

Tro grandas devi'...
Kio okazis ĉe vi?

**Barbulo**
*(montrante perkape al sia kunulo)*

Permesas li morti
Al la apudulo...
Aŭ ino apuda.
Malfruas aborti.
Li estas tro dura.
Jen kia kokludo...

La homo en nigro komencas laŭte ridegi, eĉ ĝis larmoj.

**Homo En Nigro (persono enigma)**
*(forviŝante la larmojn)*

Amuzas ege via angulet',
Mi ne bezonos eble eĉ reven-bileton.
Vi (montrante al la maljunulo) restos mia brila amulet',
Kaj vi (montrante al la barbulo) kokludos en la besta teatreto.

Sekvas perfingra frapo de la homo en nigro kaj ĉio falas en mallumon.

## Sceno 4

Homo en nigro staras en iu malluma spaco, kvazaŭ iu kaverno, tenante enmane kokon. Surbruste li havas amuleton – eburan ĝiban homan figureton. Centre de tiu spaco staras granda videble marmora fotelo kaj malantaŭe – malnovmodelaj televidilo kaj videomagnetofono. La enigmulo sidiĝas en la fotelon kaj lanĉas videon.

**La ĉifonuloj**
*(kantas el video, ĉiuj, ĥore)*

Fest'! Fest'! Fest'!
Apartan tagon festas mondo.
Jen atest' –
De l' nova vivo pulsas ondo.

Plia tramp'
Piede premos polvan vojon.
Sen eskap'
Li ja atingos Dian sojlon.

**Maljunulo**
*(kiel ŝajnas, elsube)*

Rigardu, rigardu, denove: ĉiuj, ĥore...
Pli bone po kelkaj dolaroj ili havu ĉiuhore
Pli bone...

**Homo En Nigro (persono enigma)**
*(interrompante, kolere, al la maljunulo)*

Silentiĝu!

Homo en nigro lasas la kokon kaj malŝaltas videon. Tuj post tio li, eltirinte el faldoj de sia togo incendian hakilon, firmkontakte alvenas al la televidilo kaj rapide per kelkaj frapegoj frakasas la aparataron. Farinte tion, li foriras de la sceno, kie restas promeni nur la koko.

*Sekvota venontnumere.*

Espopore (Evgenij Georgiev)

# Raymond Queneau: la tempo kaj la lingvo

## 1/ Tempo, mono kaj vivstilo

Antaŭnelonge mi paciencis ĉe kasejo de granda vendejo. Subite, du klientoj antaŭ mi preskaŭ interbatis pro afero de loko. Malantaŭ mi, maljunino tiam flustris miaorelen, timeme: "Estinte oni havis tempon sed ne monon. Nun oni havas monon sed ne tempon". Samopiniante, mi precizigu ke la koncernata "oni" ne rilatas al ĉiuj, tamen al sufiĉe nombraj el la okcidentaj mezklasoj.

Kiam mi vidas proksimulon hastigatan, mi fojfoje diras al li: "Vi pli bone prenu vian tempon, ol ĝin lasi preni vin" ("preni sian tempon" estas agadi senhaste en la franca). Mi devas konfesi, ke mi ne estas vere imuna kontraŭ tia modo de la urĝo. Ja dum la fino de historio ni havos tempon, eble ĝistede kiel sugestas Fukuyama ("La Fino de Historio kaj la Lasta Homo", 1992)... Ni havos tempon, esperante ke ĝi ne koincidos kun la fino de la homo...

Tempo estas mono, tutcerte... kaj mono estas varo, hodiaŭ pli ol iam necesa vivrimedo. "En Usono la dolaroj maloftiĝas dum la vendejoj estas plenplenaj. En Sovetunio reciproke rubloj ne mankas sed la vendejoj oftege malpleniĝas". Tion asertis ekonomikisto miamemore (ĉu Galbraith?) en la malnova epoko de la 1970a jardeko, tiu de la ora tempaĝo de la kapitalismo (ankaŭ de la ŝtata socialismo). Al kio servas mono, kiam mankas la aĉetaĵoj? En tiu tempo jam fora, estis ja malpli da varoj tra la tuta mondo... kaj pli da tempo, oni kuris malpli rapide.

Raymond Queneau (1903-1976) mortis en la preciza epoko, kiam tempo kaj historio ekgalopis antaŭen...

## 2/ Queneau, la tempo de lingvanarkiisto

Raymond Queneau estas samtempe filozofo kaj lingvisto, poeto kaj matematikisto, ano de la fama akademio Goncourt kaj lingvanarkiisto. Tiel, li intencas "pugen kiki la lingvaĵon" (FF, 1951). Al Esperanto, li ofte proksimiĝas per sia fonetika skribado. Ekzemple, la parizan kvartalon Saint-Germain-des-Prés (vd. Vikipedion), li skribas "Singermindépré" (prononco proksimuma: 'sinĝemindepre'). La faman gaeldevenan "whisky", kiun ni skribas "viskio" malrespekte al la originala prononco ("ŭiskio" estus ja pli trafa), Queneau trafe skribas "ouiski" (OTTBF, 1947).

Tute libera kun la franca ortografio do, Queneau povas krei afiksojn, ekzemple la prefikson "presque" ('preskaŭ'), skribante "presquoser" ('preskaŭdaci'), "presque-cocu" ('preskaŭ-kokrito'), "presque-père" ('preskaŭ-patro') eĉ "presquiste" ('preskaŭisto' [NQ, 1972]). Per tiu uzado de afiksoj, samkiel en Esperanto, li senĉese modifas la sencon de ekzistantaj verboj (ekz. 'Elle sortit enlarmée' => 'ŝi eliris enlarmigita' [sama fonto]), eĉ kreas novajn ekirante de simpla radiko, ekzemple "perroquer", kiun ni tre facile esperantigas per "papagi" (sama fonto) aŭ "néologiser" ('neologismi', LFB, 1965)*. Ĉar ne ekzistas aparte emfaza partikulo en la franca (nia "ja"), li tiucele uzas la vorton "que" (respondantan al nia 'ke'): "Comment donc que vous avez pu faire çà?" ('Kiel do ke vi povis tion fari?', sed ni prefere skribu 'Kiel do vi povis ja fari tion?' [SG, 1948]).

En 1933, Queneau komencas sekvi kursojn pri la hegela fenomenologio de Kojeve. Laŭ sia reala nomo Kojevnikov, tiu lasta estas tiam elstara fakisto pri la filozofo Hegel. La notojn, kiujn Queneau kolektas de 1933 ĝis 1939, li publikigos libroforme en 1947 sub la titolo "Enkonduko al la legado de Hegel" ('Introduction à la lecture de Hegel').

Ja tiu verko estos poste la ĉefa fonto de Fukuyama por lia verko "La Fino de Historio kaj La Lasta Homo" (1992). 1992 estas la epoko kiam Sovetunio ĵus displitiĝis, kiam Irako estas unuafoje dispremita sub usonaj bomboj, post kiam George Bush patro proklamas la Novan Mondan Ordon, nome la Usonan Pacon. La finon de historio, tiun finfinan kvietan epokon, kiun Hegel imagis realigota de Napoleon Bonaparte, kiun la ortodoksaj marks-leninistoj imagos poste kiel taskon de Stalin, Fukuyama tiam atribuas kiel mision al la usonaj novkuloj. Bush anstataŭas Napoleon, kiu tiom impresis Hegel en 1806, okaze de la batalo de Jena. Cetere, Fukuyama neniele povus skribi sian verkon – komercan sukceson ebligantan al li enkasigi grandan kvanton da mono – sen la laboro farita dum jaroj de Queneau, ĉefa fonto, kiun li ne citas en sia peza libro. Dankon!

Geniulo voranta la vivon plendente, Queneau estas fakte obsedita de la tempo. "For del* temp', del spac', homo vagas", skribas li (LZ, 1943). Erudiciulo, ĉiotuŝanto, li priploras iun malfortiĝon de la vortoj, kiujn oni metas "en grandajn tombejojn, kiujn mokaj mensoj nomas la vortaroj" (vd. la tutan poemon en Sulo 9-10 2016). Li kompreneble preferas la vortojn vivantaj, evoluantaj. Ilin, li tamen ne hezitas modeli, ofte redukti, ĉar la tempo urĝas. "Mi ne 'tjele' (aŭ 'tjome') timas" titolas li poemon, anstataŭ la klasika "tiome" aŭ "tiele" ("Je crains

pas ça tellment" IF, 1949). Ĉi tie temas fakte pri timo de la morto, kun tiu fina strofo: "Lacigita nun, del* rulada hor', kiel muletrondirado en horloĝ', permesu, pardonon, al tiu trista kap', plende flustri la neniaĵkanzonon" (libere tradukita de mi).

Por doni pli precizan ideon pri lia skribmaniero, mi provis verki "El Temp", poemeton laŭmaniero de Queneau:

## 3/ El Temp

*Antaŭ Temp*
*Oni povis el Temp*
*Ĝui dum temp'*

*Kreski, el Temp*
*Iri, el Temp*
*... Kaj reveni*

*Ridi, el Temp*
*Preĝi, el Temp*
*... Kaj pripensi*

*Rakonti, el Temp*
*Tiom da belaĵoj!*
*Kanti, el Temp*
*... Maljuniĝi*
*... Kaj ami*
*Jen morti...*

*En nuna Temp*
*L' hom el ĉia temp'*
*Trotas el Temp*
*Ne plu stas temp'*
*Ĝui el Temp*

*... Kaj tamen*
*En ĝusta Temp*
*Trafas ŝlin mort'*

(Poemo de franclingva nekonato afiŝita en kafejo, esperantigis mi).

Mi devas krome precizigi iun vortludeton pri tiu "Temp", dekomencan. La titolo "El Temp" aŭdiĝas kvazaŭ "l' temp(o)" dum ja temas pri EL(irado) la prizonon de la TEMP(o), kvazaŭ elirado historion. Tiu prefikso "el" cetere, estas ankaŭ la araba aŭ hispana artikolo. Vivu la polisemio!

## 4/ Konkludo: Kial Queneau ne estis esperantisto

"La laborista movado baziĝas sur la plej rigora kritiko al la ekzistanta socio. La kritiko ja estas ĝia vitala elemento. Kiel ĝi povus reteni sin de la kritiko, malpermesi la debaton?" (Engels al Gerson Trier, 1889).



**Francis Fukuyama**

Queneau eniras beletron komence de la 1930a jardeko, je la preciza momento, kiam aperas la "Vojaĝo ĝis noktofino" de Louis-Ferdinand Céline. Notinde per sia franca parolata, "la franca de la strato", Céline havos grandegan influon al Queneau. Tiu lasta observas, ke jam ekzistas du specoj de araba – dialekta kaj beletra –, de greka – demotika kaj katarevusa* –, de latinida – klasika kaj vulgara ... Sian propran parolatan lingvon, Queneau nomas "nov-franca" (BCL, 1950). Li eĉ asertas ke la franca de beletro estas morta lingvo. Poste li agnoskos prian eraron. Tio estas diskutinda. La franca senteble evoluis dum la 20a jarcento ekde Céline, Queneau kaj poste tuta plejado da junaj talentoj, kiujn ili influis (Bazin, Beckett, Gibaud, Ionesco, Perec, ktp). Ne ekzistu fakte kontraŭeco inter parolata kaj beletra lingvo sed interhelpo, interriĉiĝo.

Komence de la 1930a, Queneau partoprenas en rondo "le Cercle Communiste Démocratique", fondita de Boris Souvarine. En tiu politika grupo agadas ankaŭ nia kamarado Lucien Laurat (fondinta membro de SAT). Ambaŭ aŭtoroj kunlaboros tuj poste en fama revuo "La Critique Sociale" ('La Socia Kritiko'), kvazaŭ organo de tiu rondo. Queneau, tutcerte konas delonge Esperanton. Eble li lernis ĝin (li scias multaliajn lingvojn), kaj tio lin helpegis en lia arto. Lia propra logiko, liaj beletraj procedoj, estas tro proksimaj al tiuj de Esperanto. Li verŝajne havas kun Laurat prian rememoron. Ŝajnas tamen, ke li ne tro kroĉiĝas al la lingvo universala. Al ĝi, mi ne trovis ajnan aludon en lia verkaro. Male li kreas ian "eŭropanton" antaŭ la nomo, kiun li nomas "novbabela" ('néo-babélien', LFB, 1965).

Ekde tiam oni povas sindemandi



**Louis-Ferdinand Céline**

kial Queneau, inter multaliaj apertaj spiritoj, famuloj, kvazaŭ bojkotas Esperanton. Jam antaŭ li Orwell ekkonis nian lingvon, eĉ loĝis kun Lanti, poste tanĝis esperantistojn dum la hispana civitana milito (interalie la faman gvidanton Andreu Nin*).

Mi ne kredas, ke tia malbona famo de Esperanto venas de la zamenhofa filozofio. Ĉu ne havus prian

respondecon la aktiva esperantisto mem? Ĉu, sub epidermo iomete libereca, fantazia, tiu ĉi ne fojfoje kondutus, laŭkaze, kiel elitisto, retorikulo, rutinemulo, konservativulo, sektema gregulo, purisma pedanto*, aŭtoritata jakobeno, konformisma skolastikulo ... en la senfina etero? Ĉu tio ne estus granda bremso al la evoluo de la lingvo? Antaŭnelonge mi ĉeestis debaton pri propraj nomoj* celante scii, ĉu oni skribu 'Palestino' aŭ 'Palestinio', kvazaŭ temus pri tero sen homoj. Kial ne 'Palestina'*? Kion pensas la interesatoj?

Queneau dum jardekoj estis eldonata de Gallimard, la plej fama franca, "burĝa", eldonisto. Ĉe tiu lasta li direktoris la "Enciklopedio de la Pleïade". Hodiaŭ, iu esperantista Queneau neniam trovus eldonejon en nia nuna Esperantio. Ankaŭ nia lingvo atendas sian Plejadon...

## "Pri diversaj kredofobioj": Post-skribado forme de "erratum"

"Ankaŭ 'senkristanigantoj' (de la franca revolucio) povas toleri pastrojn sed povas aliflanke senkapigi ilin. Dum la hispana enlanda milito anarkiistoj transformis preĝejojn al porkejoj. En Kamboĝo la ruĝaj kmeroj same faris al la moskeoj. Tio ne estas hazardo, ke du ĉefaj bastionoj de SAT, Hispanio kaj Francio, estas patrujoj de pastrovoroj (mi celis envere pastrofoboj, "pastrovoro" venas de la franca "voranto de pastro": 'bouffeur de curé'). La Franca Revolucio, la Pariza Komunumo, la Enlanda Milito de Hispanio postlasis iajn spurojn.

Kompreneble, longtempe antaŭ tiuj maldekstraj "kredofoboj", apartenantaj do al maldekstraj klerikaroj (alivorte al hierarkioj, "nomenklaturoj"), la fobiuloj estis en la ekleziaj klerikaroj. Kaj oni ĉiuj, kristanofoboj, islamofoboj, kredofoboj, revoluciulofoboj, ĝojege sin gorĝtranĉas unu la alian!!! Ĉiu siavice!!!"

Tion skribis mi, la 26an de oktobro 2015, en mesaĝo de la SAT-Diskuto. Sekve de la PIVa neologismo "ksenofobo", mi tiel kreis, laŭmaniere de Queneau, la neologisman sufikson "fobo" (kiu signas homon trafitan de aparta frenezo, miksaĵo de timo kaj hato). Poste, la kamaradoj de la RoKo (Redakta Komitato de Sennaciulo) honorigis min publikigante grandan fragmenton de la mesaĝo en Sulo (marto-aprilo 2016). Sed kia surprizo! Je la apero de Sennaciulo mi konstatis, ke provleganto transformis la ĉi-suprajn "foboj" ('kristanofoboj', ktp) al tiom da "fob-iul-oj" (kristanofob-iul-oj, islamofob-iul-oj, kredofobi-ul-oj, revoluciulofob-iul-oj). La estimata leganto bonvolos se necese kontroli ĉe yahoo-groups. La superfluan "iul", mi neniam skribis. Ne nur la tradukanto, ankaŭ la korektanto povas perfidi...

ĜEMIL KSUS

# Glosaro kaj notoj (*)

**BCL:** "Bâtons, chiffres et lettres" ('Bastonoj, ciferoj kaj literoj').

**Del:** "De la", mi formis tiun neologisman prepozicion bilde de la itala "dei" (aŭ "degli") kaj ĉi-kaze de la franca "du"; ambaŭ estas kuntiraĵoj de "de la".

**Demotika kaj katarevusa:** Kun o-finaĵoj la esploristo trovos interesajn artikolojn ĉe la diverslingva Vikipedio, ekde la esperanta paĝo.

**Eŭropanto:** Ŝerca "internacia planlingvo" proponita de Diego Marani, tradukisto de la Ĝenerala Sekretario de la Ministra Konsilantaro de Eŭropa Unio en 1996 (la sekvo ĉe Vikipedio).

**FF:** "Philosophes et voyous" ('Filozofoj kaj huliganoj', kvankam publikigita en 1951, la teksto estis verkita en 1939-1940).

**IF:** "L'Instant fatal" ('La pereiga momento').

**LFB:** "Les fleurs bleues" ('La bluaj floroj').

**LZ:** "Les ziaux" ('La birdoj', sed laŭ la mallongigo estus nur 'la rdoj').

**NQ:** "Le néologisme chez Queneau" ('La neologismo ĉe Queneau', de A. Dopagne, Bruxelles, 1973).

**Novkulo** (de la angla "neocons") estas kunstreĉo de nov-konservativulo. Tute ne temas envere pri konservativulo, ĉu nova aŭ ne (kiel oni povus kredi), male pri danĝera revoluciulo, ĝihadisto de la merkato. Vd. la tutan artikolon "Kiuj estas la veraj 'novkuloj'?" en Sennaciulo 2013 09/10, ankaŭ konsultebla ĉe "http://satesperanto.org/KIUJ-ESTAS-LA-VERAJ-NOVKULOJ.html?var_recherche=novkuloj"

**Palestina:** Vd. ĉi-poste: 'propraj nomoj'.

**Pedanto:** Homo, tre precize plenumanta la regulojn, tro zorganta pri malgravaj detaloj kaj rutina formo (PIV). En sia "Bona Lingvo" (1989), Claude Piron ade kritikas la francojn pro tia manio. Miaopinie ĝi tute ne estas apartaĵo de la francaj esperantistoj.

**Propraj nomoj:** Vd. mian prian artikolon ĉe http://satesperanto.org/Gxemil-Ksus-Kian-lingvon-uzu-la.htm. En tiu teksto, mi notinde montras, ke Zamenhof "konsciiĝis progresive pri la danĝero de provo rilate al tiutema harmoniigo kun 'bone difinita komuna regulo', pri la danĝero de unuformeco. Li tiel evoluis direkte al iu libereca sistemo". Rilate al tiu kampo de la propraj nomoj mi aldonas la sekvan ekzemplon "de unu el miaj du hejmlandoj, kiun oni kutime nomas "Alĝerio" (laŭ rekomendo de nia akademio). La vorto fontas el la araba El Ĝezajer, kiu signifas "insulon" kaj poste fariĝis franclingve "Algérie". Kiu scias ĉu morgaŭ, kiam nia finvenko proksimiĝos, dek mil fervoraj tiulandaj esperantistoj kunvenus, decidante oficiale nomi sian landon "Elĝezaerio" aŭ nur "Elĝezajer" (kio bonege kongruas kun la araba prononcado)?"

**OTTBF:** On est toujours trop bon avec les femmes (Oni ĉiam estas tro bona kun virinoj).

**SG:** Saint Glinglin.

# Pri perfidoj inter kamaradoj

“Sed kia surprizo!”, skribis Ĝemil. “Sed kia surprizo!!!”, skribas mi, post kiam mi finlegas la lastan alineon de lia artikolo. Sed, verdire, pli ol surprizon, mi sentas amaran seniluziiĝon pro la konstato pri tio, ke eĉ plej altestimata kamarado distordas la realon por nejuste, kaj neĝuste, kritiki la Redaktan Komitaton de Sennaciulo. Des pli surpriza estas la surprizo, se konsideri, ke Ĝemil estas membro de tiu ĉi Redakta Komitato kaj, sekve, li perfekte konas nian labor-metodon. Ĝenerale, endas rimarki, ke nia Redakta Komitato ne trudas siajn kriteriojn al la aŭtoroj, sed proponas modifojn, kiuj estas submetitaj al ilia konsento (nur okaze de la surpapere ricevitaj kontribuoj ni ne povas sekvi ĉi proceduron). Ĉi-kuntekste, “perfidi” ne eblas.

Rilate al la konkreta “perfido” imagata de Ĝemil, ŝajne perfidata de sia memoro, mi detalas la, en la realo, reale okazintaj okazintaĵoj:

– 06/04/2016 (00:00): la redaktejo de Sennaciulo sendas al Ĝemil jenan mesaĝon: “Jen, post nia reviziado, teksto via, kiun ni planas aperigi en la venonta Sennaciulo. Se vi rimarkas ion modifendan, informu al ni kiel eble plej rapide. Ni planas baldaŭ sendi la revuon al la presejo”. Kun la mesaĝo estas sendita kopio de la paĝo de Sennaciulo, kie aperas lia artikolo “Pri diversaj kredofobioj” tia, kia poste publikiĝos, do enhavanta la denuncatajn perfidaĵojn.

– 06/04/2016 (18:33): Ĝemil respondas: “Tiel pri la “kultura” artikolo, kiel pri “kredofobio”, mi nenion vidis, Pedro. Grandan dankon pro via skrupula laboro. Ne estas dubo, ke de gxi nia movado baldaux rikoltos la fruktojn”. Do, tiam, la tiama legado de la perfidaĵoj ne okazigis surprizon al Ĝemil.

Post kiam ni ricevas lian konsenton, ni sendas lian artikolon presejen. Ĝemil rajtas kritiki sin mem, ĉar io ĉe lia flanko ne bonorde okazis, sed, ĉi-okaze, la kritiko al nia Redakta Komitato estas absolute senfundamenta.

Kvankam aparte perfida (ĉar membro de la Redakta Komitato), la kritiko de Ĝemil estas nek la nura nek la plej akra el la ricevitaj. Sed, eĉ se ili okazigas al ni perdon de iluzio kaj entuziasmo, la volontula Redakta Komitato daŭre plulaboras plej honeste kaj respondece, zorgante pri la malfacila ekvilibro inter la rajtoj de la aŭtoroj kaj tiuj de la legantoj.

Amare:

Pedro Sanz



# Atomenergia politiko en Japanio kaj en ĉirkaŭaj aziaj landoj

## Vjetnamio prokrastis konstruadon de nukleaj reaktoroj

La 6an de novembro klariĝis, ke la komunista partio de Vjetnamio instrukciis al la registaro, ke tiu prokrastu konstruadon de la nukleaj reaktoroj, ĉar estas tre malfacile elspezi tiom da mono al la konstruado.

En 2010 Japanio sukcesis ricevi mendon de du nukleaj reaktoroj en Vjetnamio, sed pro tiu ĉi decido konstruado povos multe prokrastiĝi, do tio estos granda bato al la japana ĉefministro Abe, kiu intencas eksporti plej multajn japanajn reaktorojn al eksterlando por prospero de la japana ekonomio.

En Vjetnamio en tiu ĉi marto la registaro publikigis, ke la unua reaktoro ekfunkcios en 2028, sed pluraj el la nove elektitaj estraranoj timis malboniĝon de la financa situacio pro la konstruado kaj danĝeron de nuklea energio. Tamen la respondeculo de la ministerio pri ekonomio neis la eblecon ĉesigi konstruadon mem.

*(Laŭ la ĵurnalo Mainiĉi, la 7an de novembro 2016)*

## Tajvano decidis forĵeti ĉiujn nukleajn centralojn ĝis 2025

En Tajvano, en 2015 elektro el la nukleaj centraloj okupis 14,1%, kaj nun funkcias 3 reaktoroj en tri centraloj. Post la akcidento de Fukuŝima kontraŭnuklea opinio plifortiĝis kaj en majo s-ino Cài Yīngwén, kiu promesis forĵeton de nuklea energio, elektiĝis kiel la prezidento de Tajvano. Ĉiuj reaktoroj en Tajvano fariĝos 40-jara ĝis 2025. En la reviziota leĝo pri elektro-



**Chih-Kung Lee** ( 李世光 )

industrio estos klare enskribite por fermi la vojon al refunkciigo, ke ĝis 2025 ĉiuj reaktoroj ĉesos funkcii.

La 23an de oktobro en la ĵurnalo Asahi aperis intervjuo kun s-ro Lee ( 李世光 ), la tajvana ministro pri ekonomio, kiun mi tradukos.

*Kial Tajvano celas forĵeti nukleajn centralojn?*

S-ro Lee: Post la akcidento en Fukuŝima multe ŝanĝiĝis publika opinio. La nova registaro montris forĵeton de ĉiuj reaktoroj kaj antaŭenigon de recikliga energio kiel sian klaran celon. Kiam la industria mondo konstatos, ke tiu celo ne ŝanceliĝos, ĝi pozitive investos por recikliga energio kaj naskos grandan ŝanĝon.

*Ŝajnas, ke tempo mankas.*

S-ro Lee: Antaŭ ol ni klare montris nian celon, oni argumentis pri malfacileco kompensi ontan perdon 14,1% da elektro kaj dubis pri stabileco de tiu energio, kaj la konkludo estis, ke dependi de recikliga energio estos malfacile, kaj pri traktado de uzitaj nukleaĵoj, oni ĉesis pensi serioze kaj evitis konkludon. Tia pensmaniero estas la plej granda malamiko de recikliga energio.

*Kiel vi ŝanĝos?*

S-ro Lee: Nun produkti elektron el sunenergio estas teknike sufiĉe mature, kaj sunenergiaj paneloj malmultekostiĝis. Por Tajvano naskiĝos granda bonŝanco. En la markolo de Tajvano blovas fortaj ventoj, do produkti elektron el ventoj estas plej eble. Tamen mankas sufiĉa teknologio al Tajvano, do ni atendas helpon de Japanio.

*Ĉu tio estas plenumebla?*

S-ro Lee: Kiam ni celas forĵeton de nukleaj reaktoroj, ni ne demandu nin, ĉu ni povos anstataŭigi nuklean energion per recikliga energio, sed ni cerbumu pri tio, kia politiko estas necesa por ke ni ne lasu la problemon de uzitaj nukleaĵoj al nia posta generacio.

Tajvano saĝe elektis novan prezidenton kaj direktis sin al la ĝusta vojo, dume en Japanio oni elektis tiun aĉan ĉefministron kaj permesas, ke li refunkciigu pli kaj pli da nukleaj reaktoroj kaj eĉ permesas, ke li eksportu japanajn reaktorojn al eksterlando.

## Japanio kaj Barato interkonsentis pri nuklea energio

La 11an de novembro la japana ĉefministro kaj la barata ĉefministro subskribis la konsenton pri nuklea energio. Per tiu interkonsento Japanio povos eksporti nukleajn reaktorojn (inkludante nukleaĵojn, maŝinojn, instalaĵojn kaj teknologion) al Barato.

Barato eksperimentis atombombon en 1974 kaj en 1998 eksperimentis ĝin duan fojon. Ĝi ne subskribis Pakton pri ne-Proliferado de Nukleaj Armiloj (angle, Treaty on the Non-Proliferation of Nuclear Weapons: NPT), tial multaj timas, ke tiu interkonsento plifaciligos ekspluatadon de nukleaj armiloj en Barato.

Japanio suferis/as pro la du atombomboj faligitaj sur sian teron, do ĝi havas devon proponi abolon de nukleaj armiloj en la mondo, sed la nuna registaro agas tute male. S-ro Sakuma Kunihiko, reprezentanto de la suferantoj de la atombomboj, forte protestas, dirante: "Barato ne subskribis la Pakton. Eksportotaj nukleaĵoj povos esti uzitaj por produkti nukleajn armilojn. La ĉi-foja interkonsento kontraŭas la celon de NPT, kaj sekve Japanio povos engaĝiĝi en produktado de pli da nukleaj armiloj en Barato".



**Sakuma Kunihiko**




**Nukleaj centraloj en Barato**

La 27an de novembro Japanio eĉ rifuzis subskribi la rezolucion pri okazigo de kunsido de la asembleo de Unuiĝintaj Nacioj por aboli nukleajn armilojn. Nun Japanio fariĝis tute ne respektinda lando en la mondo.

## Tertremo kaj nukleaj centraloj en Koreio

La 12an de septembro okazis tertremo kun 5,8 magnitudoj en Koreio. Tiu ĉi tertremo okazis najbare de la du nukleaj centraloj Wolseong ( 月城 ) kun 6 reaktoroj kaj Kori ( 古里 ) kun 6 centraloj, kaj ene de radiuso de 30 kilometroj de tiuj centraloj loĝas 3,8 milionoj da homoj. La registaro insistas, ke la centraloj estas sufiĉe forte konstruitaj kontraŭ tertremoj, sed protestantoj proponas forĵeton de malnovaj kaj malfortaj reaktoroj kontraŭ tertremoj kaj ĉesigon de konstruado de novaj reaktoroj n-roj 5 kaj 6 en la nuklea centralo Kori.

(Laŭ la ĵurnalo Akahata la 20an de septembro 2016)

HORI Jasuo

**Okaze de la 9a de decembro 2016a, datreveno de la promulgo de la leĝo de 1905 pri Disigo de la Eklezioj disde la Ŝtato**

# Por la respekto de la sekularismo

Diri ke la sekulareco malbonfartas, estas certe maltro: mistraktita, manipulita, misfamigita, oni ne plu aŭdacas aserti sin laika pro timo de la konfuzaĵoj kaj de la miskompreno. Kvankam principo de paco, ĝi fariĝas temo de malakordo. Kvankam principo de unueco trans la diferencoj, oni atribuas al ĝi soci-identigajn celojn.

La ekstremdekstro, kvankam tradicie kontraŭ-sekulara, volas alproprigi al si la vorton por pli efike inokuli sian ksenofoban venenon. Iam estinte kontraŭ la judoj, la araboj, nun kontraŭ la islamanoj. Ne eblas afiŝi sekularemon, kiam oni denuncas la preĝojn sur la strato, proksime al la moskeoj, sed tiujn subteni kiam temas pri la preĝejo Sankta Rita. Oni ne estas sekulara kiam oni fariĝas proparolanto de la plej reakciaj diskursoj de Vatikano alvokantaj por la malaperigo de la familia planado.

Ne, la Islamo ne estas nature pli malkongrua al la sekulareco niaepoke ol iam estis la katolika kulto en 1905. La sekulareco ne adaptiĝu al specifa religio, same kiel neniu di-kredanto povas postuli apartajn rajtojn. La Respubliko estas disigita de la religioj, ĝi ne organizu la kultojn.

Ni, sekularaj aktivuloj, foje trans disaj analizoj, alvokas al la starigo de komuna fronto ĉirkaŭ la fundamentoj de la respublika sekulareco, kia ĝi estis difinita de la leĝo de 1905. Ĉar sekularaj, ni rekonas ke la Ŝtato certigas kaj la konscienc-liberecon – de kredanto aŭ ne – kaj la kulto-liberecon. Ĉar sekularaj, ni asertas ke la Ŝtato agnosku, salajru aŭ financu neniun kulton. Konsekvence, la Respubliko ne decidas inter la kultoj pli-malpli respekteblaj: ĝi plu indiferentas, kun la nura limo de la respekto de la publika ordo kaj de la komunaj leĝoj.

Ĝiaj elektitoj kaj reprezentantoj devas konservi tiun neŭtralecon kadre de siaj funkcioj. La Respubliko taksas neniun laŭ ties kredoj aŭ supozataj apartenoj. Ĝi donas al la Publika Instruado la noblan taskon instrui la infanojn: konsekvence la ŝtato disponigu al ĝi la monrimedojn necesajn por plenumi la defiojn de la nuna Instruado.

Ni, aktivuloj de la sekulareco, alvokas al la plej diligenta zorgo kontraŭ ĉiuj provoj misvojigi la sekularecon el ĝiaj celoj. En tiu datrevena dato de la leĝo de 1905, ni alvokas al la plena respekto de ĝiaj fondaj principoj. La sekulareco organizas la publikan areon kaj donas signifon al la respublika civitaneco kiu garantias la demokratecon. Ĝi estas nek polico de la penso, nek filozofia elekto inter aliaj.

La leĝo de 1905 estas leĝo de libereco kiu permesas ĉiujn aliajn liberecojn. Ĝi do estu konservita.

*Fonto:*
*http://petitionpublique.fr/PeticaoVer.aspx?pi=P2016N49240*



# Poemoj de hispanaj esperantistoj en grava hispanlingva poezia revuo

*Caja de Resistencia* [Strikfonduso] estas prestiĝa hispana ret-revuo pri nuntempa soci-kritika poezio, kolektive kaj kunside farata kaj administrata, aperanta du fojojn jare (maje kaj oktobre). La poemoj en ĝi publikigatas nur trapasinte rigoran elektoprocezon fare de poezia juĝkolektivo. Ni esperantistoj povas fieri, ke por la unua numero, lanĉita pasintmaje, la poemon nomatan *2010*, de nia lirikisto Suso Moinhos, tiu kolektivo juĝis aperiginda en *Caja de Resistencia*. Sur reta paĝo [1] legeblas du versioj (la originala esperanta kaj ties hispanigo far la aŭtoro mem) de la poemo *2010*, kune kun foto de Suso Moinhos kaj lia biografio, kie oni informas, ĉefe, pri lia laboro kiel E-verkisto.

Fine de oktobro aperis la dua numero de la revuo [2]. Kaj ankaŭ ĉi-okaze la juĝkolektivo rigardis aperiginda poemon de esperantisto. Ja tio aparte min honoras, ĉar... nu... tiu esperantisto estas mi mem. Sed min ĝojigas super ĉio la bona bildo kaj la respekto, kiujn pere de niaj elektitaj poemoj la E-poezio ricevis en ĉi grava medio ekstera al Esperantujo. Grava, ĉar oni en ĝi elmontras plej interesajn, diferencajn kaj altflugajn poetikojn nuntempe praktikatajn sur la soci-kritika tereno ĉefe en Hispanio, sed ankaŭ en plej diversaj landoj (nehispanlingvaj poemoj aperas dulingve, nome en la lingvoj originala kaj hispana). Mia poemo *Apostolo de la Ideo [*] – Apóstol de la Idea* (en mia hispanigo) legeblas sur reta paĝo [3], sur kiu aperas ankaŭ miaj foto kaj biografio abunda je literatura esperantumado.

Sed mian feliĉon levas al la sepa ĉielo du mirindaj cirkonstancoj. Jen la unua: ĉi-numere, fakte, kunlaboras du esperantistoj. Ĉi-okaze, nia Suso Moinhos estis petata realigi la hispanigon de du rumanaj poemoj, unu de Răzvan Țupa [4] kaj la alian de Felix Nicolau [5]. Jen la dua superfeliĉiga cirkonstanco: la oficiala prezento de *Caja de Resistencia* okazos la 15an de novembro 2016 en la konata madrida librovendejo La Central (Calle del Postigo de San Martín, 8, apud Plaza de Callao), je la 19a horo. Al ĉi prezento estis invititaj por deklamo de siaj poemoj kelkaj gepoetoj, kies kontribuoj aperis, ĉu en unu, ĉu en la alia el la du numeroj ĝis nun publikigitaj. Nu, inter la invititoj troviĝas la du E-poetoj ĝis nun partoprenintaj en la revuo: Suso Moinhos kaj mi mem. Tial, ke ne eblos al li veni Madriden, Suso petis min voĉlegi lian poemon. Plej volonte kaj plezure mi deklamos en Esperanto kaj en la hispana tiel lian poemon kiel la mian.

Esperantistoj de Madrido kaj de pli-malpli proksimaj urboj kaj vilaĝoj estas petataj ĉeesti tiun poezian eventon, kie Esperanto kaj du el niaj poetoj rolos same digne kaj respektinde kiel aliaj lingvoj kaj, respektive, alilingvaj bardoj.

Kaj, ĝenerale, ĉiuj esperantistoj estas fervore invititaj legi kaj ĝui la revuon *Caja de Resistencia*. Super la supra dekstra angulo de la foto de ĉiu poet(in)o, fronte al l(ŝ)ia poemo, videblas vinjeto de koro. Alklakante ĝin, oni montras sian ŝaton al la responda poemo. Do, se vi tion faros pri la poemoj de Suso kaj de mi, vi pravigos la elekton faritan de la juĝkolektivo kaj la respekton montratan de ĉi medio al la E-poezio.

Sanon kaj poezion!

Miguel Fernández

[*] Vidu sur paĝo 2 (NdR).

[1] http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprenta/caja1-numero1/moinhos/
[2] http://cajaderesistencia.cc/category/caja-de-imprenta/caja1-numero2/
[3] http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprenta/caja1-numero2/fernandez/
[4] http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprenta/caja1-numero2/tupa/
[5] http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprenta/caja1-numero2/nicolau/



**Suso Moinhos**

# Folklora Vespero: Espera Mondo

Espera Mondo estas trupo de korea tradicia arto, kiu formiĝis en 1988.

Ĝi debutis en Esperantujo en la 3-a Azia Kongreso, kiu okazis en Seulo en 2002. De post tiam ĝi daŭre aktivadas kaj prezentas koreajn tradiciajn artojn en Esperantujo per Esperanto. Kiel "delegitaro" de Koreio, kiu konsistas tute el esperantistoj, ĝi estas la ununura Esperanta trupo de tradicia korea arto.

Jam reprezentanto de Espera Mondo "Verdula" prezentis sian kanton kaj dancon persone en la Braŝova SAT-kongreso en Rumanio.



**Danco de Tambureto kaj Papero** (5 min.)

Ĝi estas ceremonia danco, en kiu oni preĝas al la ĉielo doni bonan ŝancon, longan vivon kaj feliĉon. Ĉielaj spirito kaj energio estas ricevitaj en la tambureto, kaj oni sankte purigas la lokon viŝante ĝin per la papero, tiel forpelante malpuron kaj plenigante la lokon per bono.

Samullori (9 min.)

*Samullori* estas ludado de kvar frapmuzikiloj, kiu en la nuntempo rekreas koreajn tradiciajn ritmojn hereditajn de foraj antikvaj tempoj. Tiuj kvar frapmuzikiloj estas la *ĝanguo*, korea dukapa tamburo kun formo simila al sablohorloĝo, la *kkwaenggwari* [gŭaenggŭari]-gongeto, la buk-tamburo kaj la *jing*-gongo. Per ili oni esprimas la esencon de frapmuzikila ludado, unuiĝo de spiro de ĉiuj aĵoj sub la ĉielo, la Naturo kaj homoj, plena de varmega entuziasmo.

Sol-ĝanguo-**ludado** (6 min.)

Inter la diversaj koreaj popolmuzikiloj, la *ĝanguo*-tamburo esprimas ritmojn plej delikate kaj plej diversece, kaj inter la diversaj koreaj popolmuzikilaj ludadoj, la *sol-ĝanguo*-ludado, la simbolo de supereco, kapablas plej brile eltiri ĝissate la talenton de individuaj ludantoj. La fortoplenaj, vivecegaj ritmoj daŭras de komenco ĝis fino kiel tondra pluvego.

Buk-**tambura ludado** (6 min.)

La *buk*-tamburo, kies origino troveblas en la praepoko de la homa ekzistado, estas tamburo, kiu aŭdeblas en ĉiuj landoj de la terglobo, en ĉiu kazo kun sia propra distingiteco kaj siaj propraj karakterizaĵoj. La korea buk-ludado, kiu eĉ kvazaŭ haltigas la sonon de korbatado, postulas altnivelan teknikon kaj delikatan lertecon. La esperoplenaj, manŝvitigaj ritmoj de tiu ludado havas amplekson de la ritmoj de kampara laboro ĝis la streĉaj ritmoj de la post-informado-revolucia moderna mondo.

**Glavodanco** (4 min. 30 sek.)

Glavodanco havas longan historion kaj tradicion en Koreio. Ĝi estis prezentata jam antaŭ ĉirkaŭ mil kvincent jaroj. De antikva epoko glavo estis simbolo de rego per bono kaj defendo kontraŭ diversaj demonoj. Ŝajnas, ke vigla kaj vivanta dancado agordiĝas kun Esperanto kiel simbolo de espero.

Arirang**, Koreaj Popolkantoj kaj** Ganggangsullae (15-20 min.)

Jam delonge en sia vivo koreoj esprimas per popolkantoj vivon kaj malsanon, maljuniĝon kaj morton, plezuron kaj ĝojon kaj koleron kaj malĝojon, same kiel homoj en aliaj landoj. El niaj multaj popolkantoj, *arirang* estas la plej fama, eĉ fariĝis nia nacia himno. Ĉiuj koreoj sentas la saman emocion kiam ili aŭdas aŭ mem kantas *arirang*. *Ganggangsullae* estas la plej vigla kanto kaj ludo, per kiu unu animo formiĝas en granda cirklo de homoj saltantaj kune manon en mano.

**Nobela Danco** Oğŭangdae **[Kvin Roluloj]** (5 min.)


*Oğŭangdae* estas danco de kvin maskitoj: leprulo, nobelo, bonzo, paviano kaj *ĉemil*, iu ĵaluza virino. La formoj de la maskoj kaj la dancoj esprimas la respektivajn karakterojn. Ili reflektas la vivon de la popolanoj kaj satire traktas la vivon de la nobeloj.

*Pungmulpangut* **aŭ Ludo de Popolaj Muzikiloj** (10-13 min.)

La *pungmul*-ludo, kiu naskiĝis de la komuna laborado en korea tradicia agrikultura socio, esprimas kiel ĉiuj sendepende de aĝo aŭ sekso foje faris tian laboro kune, kaj la perfektaj unueco kaj unuanimeco montrataj en ĝi montras la forton de tia kunlabora komunuma socio.

*El la retejo de la 90a SAT-kongreso http://sat90.org/2017/02/15/kulturaj-programoj/*

# Insulo Ganghwa



Invadantaj japanaj soldatoj el militŝipo Unyo, 1875

56 kilometrojn okcidente de Seulo, en la gorĝo de la rivero Han fluanta al la Flava Maro (Okcidenta Maro), estas la insulo Ganghwa (Ganghwa-do). La insulo Ganghwa estas la 5a plej granda insulo, kaj la loko havas abundajn historiaĵojn kaj naturan belecon.

La insulo fieras pri antikvaj fositaj dolmenoj, altaro por Dangun (la legenda fondinto de la unua antikva regno en Koreio), turoj de signalfajro, kaj pagodoj. Jeondeungsa (templo Jeondeung), kiu situas ene de 1,6-kilometra ĉirkaŭmurigita fortreso kun kvar pordoj, estas la ĉefa allogaĵo.

La historia graveco tra kelkaj jarcentoj de la insulo Ganghwa devenas de ĝia situo proksime al Seulo kaj al Gaeseong (Songdo). La loko estis uzita kiel rifuĝejo de reĝoj fuĝantaj el la invadoj de mongoloj kaj manĉuroj en la 13a kaj 17a jarcentoj, dum, respektive, la dinastioj Goryeo kaj Joseon. La insulo situas en la marbranĉo de la rivero Han, kiu mastras la aliron al Seulo per akva vojo. Kelkfojaj bataloj kun eksterlandaj mararmeoj okazis ĉi tie en la lastaj jaroj de la "Ermita Reĝlando" tuj antaŭ la komenco de la kontakto de Koreio kun la ekstera mondo en 1876.

En 1876, la Traktato de Ganghwa, la unua malegaleca traktato inter Koreio kaj Japanio, estis farita pro trudo de la Japana Imperio, kiu antaŭe bombardis per kanonoj el la militŝipo Unyo. Ekde tiam, Koreio faris komercan traktaton kun Usono (1882) kaj eniris en mondan kapitalisman ordon establante komercajn traktatojn kun eŭropaj landoj inkluzive Brition.

*Informo el la retejo de la 90a SAT-kongreso*
*http://sat90.org/2017/02/10/ganghwa-insulo/*






## El la SAT-Administrejo

# Novaj aliĝoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| 36088 | SAPOĴNIKOV Vladimir | RU 660100 - KRASNOJARSK | Rusio |
| 36089 | POWER Shayne | AU 6027 WA - HEATHRIDGE | Aŭstralio |
| 36090* | TITS Viviane | BE 4031 - ANGLEUR | Belgio |
| 36091 | SANTOS João-José | PT 1170-109 - LISBOA | Portugalio |
| 36092* | NOIREAU Françoise | FR 81630 - TAURIAC | Francio |
| 36093 | CHADELAUD Michel | FR 38960 - SAINT-ÉTIENNE-DE-CROSSEY | Francio |

# Pri pensaĵo de Susan George

Jes ĉi tiu teksto estiĝis en referenco al pensaĵo de Susan George (eĉ se la dirita persono estas laŭ mi nun ekstempiĝinta, t.e. ŝi povis konsistigi ian esperon kaj figuron pri digneco en 1997, sed nun la progresemaj burĝoj en la stilo de ATTAC, la alieŭropismanoj, la Monda Socia Forumo, ĉio tia estas senpova, nekohera, supraĵa, frazema, malmetoda, kaj servas nur al rebonigo de la povo de niaj mastroj; necesas "aŭdaci la penson" kaj radikaliĝi, ĝuste! Kiel Bernard Friot, kaj François Asselineau, kaj Etienne Chouard, kaj ni ne forgesu la maljunan Danielle Bleitrach! Ne ekzistos savo por malpli ol tio), do mi diris : La famkonata "Lula", la eksa prezidanto de Brazilo, diradis :



**Susan George**

"Tiu, kiu 20-jara ne estas komunisto, tiu ne havas koron, kaj tiu, kiu 40-jara tio plu estas, tiu ne havas cerbon."

Nu, ju pli mi pensas pri la afero, des pli mi persvadiĝas, ke pravas LA MALO fakte. Jes la malo! Pripensu bone ankaŭ vi!

Susan George eble ne sciis kiom ŝi pravis dirante, ke nur estas honorindaj (jes ja! Kiam oni vidas ekzemple fiulojn kiel J.M. Barroso! Ĉu vi konas lian biografion? Interesa temo!) kaj inteligentaj tiuj, kiuj radikaliĝas dum maljuniĝo. (Jen finfine la anoncita pensaĵo de Susan George! Mi rediras ĝin, ĝi estas :

"Mi aprezas tiujn, kiuj radikaliĝas dum maljuniĝo").

Nu, bone, mi aldonos iometajn klarigojn al mia aserto, des pli ke – se vi pripensis ĝin! – estas du manieroj formi "la malon" de la Lula-a frazo. Kaj ambaŭ veras!!

1.- Kiam oni estas komunisto je la 20-a aĝo tio estas ĉar oni ne havas cerbon (kiel la 1968-aj ribeluloj per sekvismo, furorismo, konformismo inter junuloj), kaj se oni ne plu estas tia je la 40-a aĝo tio estas, ĉar oni ne havas koron (burĝiĝintaj, oni dorlotiĝas egoisme en sia komforto gajnita de bela kariero de la eks-studentoj, kaj oni lasas sin korupti de la establita ordo, dum oni lasas mortaĉi ties viktimoj).

2.- Tiu, kiu ne estis komunisto kiam 20-jara, estas ĉar li havis koron, kaj tiu, kiu iĝas tio kiam 40-jara, estas ĉar li havas cerbon. Jes se ni revenas al la jaroj 50aj kiam oni estis komunisto 20-jara, estis ĉar oni ne havis koron kaj oni sidadis senhonte sur ĉiuj la teruraĵoj, kiujn oni eksciis pri la estinteco kaj la estanteco de USSR, pro pragmatismemo aŭ fanatikeco. Kaj kiam oni ĉesas esti komunisto 40-aĝe, tio estas ĉar oni ne havas cerbon : tie estas certe la plej grava de la tuta rezonaro, sed ankaŭ la plej malfacila por resumi en kelkaj vortoj, tio estas ke oni ne komprenis la funkciadon de la mondo, ke oni ne vidas tion, kio okazas nun, kaj kio atendas nin, ke oni kredas, ke oni povus elturniĝi pere de duonpaŝoj kaj malkuraĝaj kompromisoj (kio ja estas, kion deziras la malamikoj de la popolo), ktp, ktp, tion oni devus multe pli malfaldi por esti komprenebla. Nu, eble mi ne havos la kuraĝon tion fari, sed, se vi havas cerbon, vi ja jam scias, ĉu ne?!

Ek! Kuraĝe! Informu vin pri la mondo kaj bone cerbumu.

Roland Platteau,
*la 5-an de septembro 2016*

# La trumpeto marina



Revenis laŭmoda en tiuj nunaj tempoj en Francio, malnova ne ofte uzata muzik-instrumento nomata franclingve "Trompette marine" (angle: *Trumpet marina*; hispane: *trompeta marina*; itale: *tromba marina*...). Ja 'stas trompa la nomo, ĉar ĝi havas nenian rilaton kun la trumpeto estante korda muzikilo, nek kun sinjoro Trump kiu ne ĝin kreis; ankaŭ trompa rilate la adjektivan precizigon, ĉar ĝi neniel rilatas al la maro (fr: *marine* = mara), nek al nia "trumpeca" Marino, kiu ĵus pretendis al la franca-trono, sed fakte al la "Sankta Virgulino", pro dediĉo de tiu muzikilo al ties kulto ("*Marien-trompete*" en la germana).

Nur unukorda muzikilo ludata laŭ harmonoj, kun sono similanta tiun de trumpeto (jen kial ĝia nomo), ĝi vesonas sur la politika scenejo, harmonie glitanta pli kaj pli Trump-ecen.

*Serĝo (32412)*

# Jakobo Fiŝu' (Jacques Fichou)



Nia kamarado Jacques Fichou 35517 aliĝis al SAT en la jaro 2001. Li forpasis la 11an de decembro 2016.

Jakobon, kiel li sin mem nomis, mi dum pluraj jaroj ĉiusemajne renkontis en la SAT-Amikara sidejo, dum la sabata deĵoro, al kiu li kontribuis jam antaŭ mia partopreno (mi stafetis Lilion, kiu hazarde ankaŭ mortis ĉi-jare). Fervora pacisto (kvankam – aŭ ĝuste ĉar! – laborinte en armil-industrio), li ankaŭ, krom esperantisto, estis antaŭe abundisto kaj mondcivitano (el ĉi lasta movado li lernis pri Eo). Pro gravaj aŭdproblemoj li tre malfacile partoprenis parolajn diskutojn, sed li multe legis (kvankam li Esperanton ne parolis, flue li legis ekz. Sennaciulon tre atente) kaj tre entuziasme malkovrigis al mi la movadon pri disdona ekonomio. En siaj lastaj jaroj eĉ malgraŭ gravaj sanproblemoj li daŭrigis viziti la sidejon, en kiu li ĝojis havi okazon prezenti siajn ideojn kaj praktiketi la lingvon.

MARKOVO-VITO 35521



# Vladimir Bespalov

La 2an de februaro 2017, nokte dumdorme, subite mortis Vladimir Bespalov. Li naskiĝis la 21an de januaro 1940 kaj lernis Esperanton en 1963. Li estis unu el la unuaj aktivuloj de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado) kaj senlace agis en Esperantujo dum duonjarcento. Ĉiam konvinkita komunisto, li estis unu el la gravaj aktivuloj de IKEK (Internacia Komunista Esperantista Kolektivo) kaj membro de SAT; partoprenis en kelkaj SAT-kongresoj, kaj laste en tiuj de Jalto kaj Madrido, en kiuj faris respektivajn prelegojn. Li certe mankos al ni ĉiuj.

NIKOLAO GUDSKOV

Vladimir estis bona kamarado. Li kunhavigis tion, kion posedis. Ni interkonatiĝis kiam mi ĉeestis GeLERT-2009 (Krinitsa, Nigra Maro, Rusio). Mi pasigis kun li grandajn momentojn kaj havis vere bonan amikecon kun Vladimir. Miajn kondolencojn al ĉiuj niaj komunaj amikoj, samideanoj kaj familianoj. Brakumojn por ĉiuj! Vladimir por ĉiam en niajn mensojn!!!

JUANJO CRESPO



# DONACINTOJ

## Solidarkaso

| | | | |
|---|---|---|---|
| EBERSPACHER Kurt | 52,00 EUR | GIBBONS Daniel | 6,65 EUR |
| XIONG Linping | 5,65 EUR | Anonime 1 (Paro) | 30,00 EUR |
| BÜHL Hans-Herman | 48,00 EUR | BOURLOT Carlo | 60,00 EUR |
| BANDINI Alberto | 30,00 EUR | RASMUSSEN Ulrik-Charlie | 4,00 EUR |
| NOURMONT Claude | 48,00 EUR | SIGNORET Paul | 96,00 EUR |
| MICKLE Gary | 48,00 EUR | TORTEL Jean-Luc | 6,00 EUR |
| SCHERM Michael | 8,00 EUR | Anonime 2 | 50,00 EUR |
| GERARD Laurent | 4,00 EUR | ELIARD Eric | 18,00 EUR |
| BANNIER Jacques | 52,00 EUR | QUILLAUD Pierre | 8,00 EUR |
| KESSOUS Djemil | 56,00 EUR | PLUTNIAK Edmond | 8,00 EUR |
| GIRARD Véronique | 53,00 EUR | BLANCHAIS Jean-Marc | 8,00 EUR |

## Helpfonduso kongreso

TILLEMAN Jehosua 20,00 EUR

## Subteno al informadiko por SAT

Anonime 2 470,00 EUR

# Perantoj

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete : fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1 , BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916
Rete : cglady@arcadis.be
Bankkonto : 750-6373051-18
IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Ivica Horvat
Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino
rete : ivica.h@hs-hkb.ba
**Brazilo** – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete : esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa) : +557 7988011780
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel. : +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete : ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉeĥio** –Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel. : +420.737230231, rete : stiburek.v@seznam.cz
IBAN : CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT : FIOBCZPPXXX
**Ĉinio** – BRUNO GUY CLAUDE HENRY
rete : esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto N°6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC : BKCHCNBJ970
BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong Road (M) CHANGSHA - HUNAN -ĈINIO
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete : barthelemy.maurau@free.fr
Bankkonto : 1733310 N 020
IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070
BIC : PSSTFRPPPAR
**Germanio** – Dominik Schramm
Möhringer Straße 43, DE-70199 Stuttgart, GERMANIO
rete : dominik.schramm@gmx.net
**Hispanio** – Pedro Maria Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete : pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – Tóth Zsolt
Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario
Tel : +36-20-5188919 , rete : zstoth75@gmail.com
Bankkonto : 11773377-00000354
IBAN : HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000
BIC : OTPVHUHB
**Italio** – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) , Italio
rete : carlo.bourlot@gmail.com
Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993
Poŝtkonto : n-ro 43976158
Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,
Kodo BIC : BPPIIRRXXX
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete : b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete : sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto : 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio**
Viktoro Solé – KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: v.sole@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu
KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do
rete : paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
Otok Brac, HR-21414 Gorni Humac, Kroatio
Tel : +385.21.647.059, Poŝtel : +385.098.182.79.07
rete : ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Poŝtkonto : 3200129804 Splitska banka
IBAN : HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC : SOGEHR22
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel : +37068736457, rete : grazopul@yahoo.com
Bankkonto : LT347300010001720030
BIC/SWIFT kodo : HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete : llrespr@libero.it
IBAN : MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
**Portugalio** – Manuel Luis Pedrosa Alves
Estrada Principal, 79, Morelinho, PT-2710 Sintra, Portugalio
rete : morelinho_sintra@hotmail.com
**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete : nikolao@orc.ru
**Serbio**
Miomirka Kovačević, Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete : ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto : Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN : SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC : NDEASESS
**Svisio** – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
**Tajvano** – CHO Chaoming
12F2, No. 41 , Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung
rete : cmcho@so-net.net.tw
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete : classs@bigmir.net, telefone : 380 67 99 470 03
**Aliaj landoj**
SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso) : kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj) : financoj@satesperanto.org
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto : 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC : PSSTFRPPPAR
eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA : satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal : financoj@satesperanto.org

# Kotizoj 2017

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 24 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstralio | 52 € | Kroatio | 16 € (120 HRK) |
| Aŭstrio | 52 € | Kubo | 4 € |
| Barato | 8 € | Latvio | 16 € |
| Belgio | 52 € | Litovio | 16 € |
| Bosnio-Herc. | 12 € | Luksemburgio | 52 € |
| Brazilo | 20 € | Madagaskaro | 4 € |
| Britio | 52 € (40 GBP) | Makedonio | 12 € |
| Bulgario | 12 € | Malio | 4 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Mongolio | 8 € |
| Ĉinio | 8 € (56 CNY) | Meksiko | 16 € |
| Danio | 52 € | Nederlando | 52 € |
| Estonio | 16 € | Norvegio | 52 € |
| Finnlando | 52 € | Pollando | 16 € |
| Francio | 52 € | Portugalio | 28 € |
| Germanio | 52 € | Rumanio | 12 € |
| Grekio | 8 € | Rusio | 16 € |
| Haitio | 4 € | Serbio | 12 € |
| Hispanio | 40 € | Slovakio | 16 € |
| Hungario | 16 € | Slovenio | 16 € |
| Irano | 12 € | Svedio | 52 € |
| Islando | 36 € | Svisio | 52 € (64 CHF) |
| Israelo | 36 € | Tajvano | 32 € (1160 TWD) |
| Italio | 48 € | Turkio | 16 € (52 TRY) |
| Japanio | 52 € (6960 JPY) | Ukrainio | 8 € |
| Kanado | 52 € (80 CAD) | Usono | 52 € (64 USD) |
| Kolombio | 12 € | | |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.

> **Nura abono al Sennaciulo : 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Help- kaj grupmembroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.


*Sennaciulo*
Oficiala organo de SAT

**Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Sekretario:* Diana Riŝar
*Kasisto:* Bruno Henry
*Membroj:* Guy Cavalier, Franjo Martin, Pedro Sanz, Dominiko Simeone

**Sennaciulo**
*Redaktoskipaj kunordigantoj:* Vinko Markovo, Pedro Sanz
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale.
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 39 €
Autres pays/*aliaj landoj:* peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 20 G 86567

# Alia mondo eblas



Printempe ĝi palpeblas,
alia mondo eblas.
Florado estas kri'.
Sub arbo oni festas.
Printemp' ribelo estas,
naturrevoluci'.

Burĝonoj fine krevas,
el grizo sin eklevas,
jen kreskas la esper'.
Je floroj jam palpeblas,
ke mond' alia eblas
sur nia tuta Ter'.

Printempkantistoj trilas,
muziko ekbabilas,
rondiras kun la vent'.
Dum la printemp' palpeblas:
alia mondo eblas,
tutnova mond' laŭ sent'.

Hans-Georg Kaiser

# Iam, en Edeno

**Bilda Delirâjo far Sire**

